

APOKALIPSA EPOKO

Paroli pri la libro de la "Apokalipso" signifas kontaktiĝi kun unu el la plej interesaj tekstoj de la Nova Testamento, tamen ankaŭ kun unu el la plej komplikaj, kaj laŭ literatura nivelo kaj laŭ enhavo. Malgraŭ la intereso estigita de la Apokalipso mem, tamen superregas la legantojn forta malfido rilate ĝian mesaĝon, ĉar ĝi estas facile miskomprenita kaj oni malpliigas ĝin al sciigo pri la lastaj tempoj, kiam la Dia juĝo estos akompanata de kosmaj malordigoj kaj mondaj katastrofoj. Krome, inter la skriboj de la Nova Testamento, tiu de la Apokalipso restas unu el la malpli konataj, ĉar, pro sia malsimpleco ĝi preskaŭ forestas el la vivo de la kristana komunumo.

Pro tio la esprimo "Apokalipsa Epoko" allasas miskomprenojn, ĉar en la kuranta lingvouzo ĝi fariĝis sinonimo de "katastrofo", aŭ ĝi identigas la libron de la Apokalipso kiel kolekton de profetaĵoj, kie koncentriĝas antaŭvidoj de teruraj estontaj okazintaĵoj kiuj alportos la nunan mondon kun ĉiu ĝia historio ĝis sia fino.

La apokalipsa disputo

La terminoj **apokalipso** / **apokalipsa**, oftaj vortoj en la nuna lingvouzo, akceptas ofte trajtojn eksterajn al ilia origina signifo, kiu estas tiu de revelacio (gr.*apokaliptō* = forigi la vualon). La teksto de la Apokalipso sin tenas, parte ĉe la karakterizaĵoj de literatura pensmaniero (**la apokalipsa**), kiu evoluis en la judaismo ekde la II jarcento antaŭ Kristo, kiel literaturo de konsolo, sed ankaŭ kiel literaturo de kontestado, por plifirmigi la kredon de la fideluloj kaj konfirmi la atendojn de tiuj kiuj atendis la liberigan intervenon de Dio. Temas pri alternativa literatura pensmaniero kun sektecaj karakterizoj, margene de oficialaj rondoj, interesiĝanta pri kio el la dia plano restis ankoraŭ kaŝita. Ĝi distingiĝas pro **pesimismo** rilate al la mondo kaj pro **determinismo** rilate al disvolviĝo de la historio, kies eventoj jam estis antaŭviditaj en la dia plano. La tuta afero kuntrenas fortan **individuismen**, kiu kondukas en la tenton turni la ŝultrojn al realo koncentrate la atenton sur la personan intereson kaj ĝi same kuntrenas **pasivan etikon**, kiu emas eskapi el ĉiu respondeco atendante novan mondon, kiu estos tute rezervita por la elektitoj de Dio.

Malsame al tiuj ĉi skriboj, la Apokalipso anstataŭe enhavas pozitivan koncepton pri la homa realaĵo ĉar ĝi donas en la fina vizio la kuraĝigan bildon pri ĝi - kontemplanter novan ĉielon kaj novan teron (vd. Apok.21,1) - kiel plenan realigon de la kreadplano. La verkinto ne eskapas el la historio kiu lin

cirkaŭas sed li estas tre interesita pri la okazintaĵoj, ĉar li prezentas la eventojn karakterizintaj la historion mem konforme al "ĉielo" kaj al "tero" tute ŝanĝitaj, sen iu ajn spuro de malbono (vd. Apok.12, 8). Sekve la teksto diferencas de la tipa apokalipsa skemo kaj, eĉ se ĝi plutenas kelkajn el ĝiaj plej komunaj trajtoj ^[1] nia teksto proponas unikan kaj novan vidpunktonton pri tiu literatura stilo; la verkinto trafas la celon de la komunikenda mesaĝo; la universala superregado de Dio kaj la efektivigo de Sia plano, por pleneco de vivo oferdonita al ĉiuj homoj.

Alia grava vidpunkto de la Apokalipso estas ke sia mesaĝo ne limiĝas al aparta grupo (sekto), sed ĝi direktiĝas al ĉiuj kristanaj komunumoj (la sep leteroj al la eklezioj indikas "universalismon"), per unu el la plej fortaj deklaroj entenataj en la Sanktaj Skriboj koncerne la konceptadon de la povo kaj de sia laŭdira dia deveno. Ĉar, ĝenerale, la kristanoj preskaŭ intencis sekvi la ordonon truditan de la Romia imperio^[2], la verkinto montras sian malkonsenton, kaj li skribas sian verkaĵon kvazaŭ kiel defion adresitan al kiuj volas prediki la Evangelion pere de la povevoluo, rememorante ke oni ne povas miksi la valorojn de la Regno (solidareco, egalrajteco, servo) kun la principoj de la teraj sistemoj (mono, prestiĝo, povo), kiuj estas tiuj oferdonataj de la Satano mem. Kiu legas kaj aŭdas la vortojn entenatajn en la Apokalipso tiu ne povas resti neŭtrala: aŭ oni akceptas la ideologion de la povo, sin submetante al ĝiaj principoj de morto, aŭ oni aliĝas al propono de Dio, akceptante la vivpovon de ilia amo.

Supervenki la miskomprenon

La malfacileco legi kaj kompreni la Apokalipson fontas antaŭ ĉio el manko de kono pri la kultura medio en kiu la verkinto laboris kaj pri la lingvaĵo de li uzita por verki la libron mem. Nuntempe neniu plu opinias ke la steloj reprezentas diaĵojn, aŭ ke tondroj kaj fulmoj estas ĉielaj senditaĵoj anoncantaj bonaĵojn aŭ malbonaĵojn flanke de Dio, aŭ ke ekzistas Hadeso. Koncerne la lingvon, kiu estas ege simbola, la verko devas esti taksata laŭ la gramatikaj kaj literaturaj kapabloj uzitaj de Johano. Alia vidpunkto kiu influas sur la malfacilo interpreti la tekston estas la manko de kono rilate la fonton el kiu la verkinto ĉerpas la materialon por konstrui siajn bildojn kaj viziojn. Fakte la vizioj kiuj surŝutas la verkaĵon oni akceptas kiel apartaj travivaĵoj en kiuj la verkinto partoprenis kiel spektanton, dum vere ili estas la rezulto de atenta kaj profunda medito pri la tekstoj de la Malnova Testamento.

La libro de la Apokalipso, malgraŭ la malsimpleco de ĝia literatura stilo, fariĝas komprenebla danke al la indikoj kiujn donas la aŭtoro mem. Jam en la titolo de la verko mem. **"Apokalipso de Jesuo Kristo"** (Apok.1 1), oni indikas la originon de la mesaĝo kaj ĝian aŭtoritatecon, metante ĝin en strikta rilato kun la anonco de la bona novaĵo de la Dia Regno; tial ĉio kion Johano raportas kaj priskribas en sia verko devas esti konsiderata ĉe la lumo de tiu anonco. En la komenco de la verko oni diras ke ĉiuj vortoj entenataj en ĝi estas **"profetaĵoj"** (Apok. 1, 3), nome ili havas fundamentan valoron por la kristana komunumo, ĉar ili entenas radikalan apelcion legi kaj kompreni la historiajn okazintaĵojn laŭ la dia vidpunkto. Tiuj ĉi vortoj estas la celo de la

unua beateco kiun la verkinto anoncas al leganto kaj al la aŭskultantoj: "*Feliĉaj estas la leganto kaj la aŭskultantoj de la vortoj de la profetaĵo*" (apok. 1, 3)^[3]. Ĉar temas pri teksto kiu distingiĝas pro sennombraj vizioj, nin surprizas la fakto ke tiu ĉi beateco ne rilatas "**la vidon**", sed ja "**la legadon/aŭskultadon**". Oni fakte akcentas la aŭskultadon^[4], tiu estas la sinteno kiu karakterizas la fidon de la kredanto kaj kiu rememoras ke la mesaĝo de la Apokalipso ne estas direktita al privata legado sed al tiu kolektiva^[5].

Alia indiko, por kompreni la Apokalipson, estas al ni donita de la terminoj kiujn la verkinto uzas; ekzemple por esprimi la ideon de **tempo**, li distingas inter kronologia tempo (*gr. chronos*) kiu havas limon kaj finiĝas, kaj kvalita tempo (*gr. kairòs*)^[6], kiu donas favoran okazon por agi. Pri la **kairòs** interesiĝas la unua beateco, ĉar ĝi rememoras pri la tuja proksimeco de taŭga tempo por atesti Jesuon kaj Sian Evangelion, pri taŭga tempo por agi en plena agordo kun Dio, laŭ Sia sava plano. Ekde la unuaj vortoj de la libro, Johano sin turnas al legantoj kaj al aŭskultantoj por ke ili vivu tiun favoran tempon, sinengaĝinte en la nuntempo por atesti la valorojn de la Regno, en la senĉesa streĉiteco al "novaj ĉieloj kaj nova tero" (Apok. 21, 1).

Pro tio pli ol pri "**Apokalipsa tempo**" oni devas preparoli de "**Apokalipson kaj plenecon de la tempo**". Ne temas pri vivo dum tempo kiam sin anoncas novaj revelacioj, sed temas pri kaptado de taŭga momento por profunda meditado pri la revelacio de Jesuo Kristo kaj pri la plenumo de ĝia enhavo.

Apokalipso kaj la tempo de Dio fiksita

Rilate la Apokalipson, kiam oni superas ĉiujn miskomprenojn pezantajn sur la teksto, starigas iu problemo, tiu estas kiel reakiri ĝian mesaĝon en la eklezia vivo, kaj aktualigi la gravecon de la profetaĵo entenata en ĝi. La atesto de la kredantoj estas subtenata de tiu radikala alvoko kiun Johano faras pere de sia skribaĵo favore al Dia Regno kaj al ĝia disvastigado.

Por gvidi la legadon kaj la komprenadon de la apokalipsa mesaĝo, Johano metas ĉe la komenco de ĉiu el la du partoj en kiuj dividiĝas la Apokalipso^[7], du fundamntajn viziojn centritaj sur la persono de Kristo: en la unua parto, temas pri tiu de la **Filo de la homo**, kiu rilatas Kriston kiel venkinto de la morto kaj modelo de humaneco (vd. Apok. 1, 12-20), kaj en la dua parto temas pri tiu de la **buĉita Ŝafido**, kie la simbolo de la ŝafido indikas potencon de vivo kiu manifestiĝas pere de la oferdonado de si mem (vd. Apok. 5,6- 12).

La vizioj de Johano kontribuas plilarĝigi la horizonton de la legantoj lokiĝinte en etoso kie sentiĝas la komunio kun Dio, kaj adresinte la ekziston al estonto de pleneco kiu neniam finiĝos. Por la kredantoj tiu ĉi afero implicas konkretan engaĝigon kunlabori al transformigo de la kreitaro; fronte al pagana vidpunkto pri la mondo, kie la potenculoj ŝajnas regi la sortojn de la homaro,

oni malkovras novan vidpunkton, tiun de la Spirito, kie oni rekonas Dion kiel nuran Sinjoron de la historio kaj de la kreitaro.

*** La vizio pri iu simila al "filo de homo"**

La unua vizio en la Apokalipso rilatas manifestiĝon de Kristo Resurektinta (Apok. 1, 10-18). La karakterizaĵoj kiuj utilas por identigi lian personon prezentas lian dian kondiĉon, sed ili aplikigas al li kiel "homfilo", aŭ al homo kiu atingis sian realigon (vd. Read. 7, 13). En tiu ĉi vizio estas Jesuo kiu, brilante per la sama gloro de Dio, diras en unua persono: *"Mi estas la Unua kaj la Lasta, kaj la Vivanta; kaj Mi fariĝis mortinta, kaj jen, Mi estas vivanta por ĉiam kaj eterne..."* (Apok. 1, 17-18). La aludo je la morto rekonfirmas Lian humanecon kaj, samtempe, Lia venko kiel "vivanta homo" aŭ kiel "resurektinta" konfirmas Lian diecon. Kio en la Malnova Testamento estis karakterizaĵo de Dio nun oni atribuas al la persono de Kristo, kiu havas la ŝlosilojn de la Hadeso, la regno de la mortintoj, kiel signo de la plena venko super la morto^[8].

Antaŭ ol priskribi la vizion, la verkinto donas precizajn indikojn kiuj helpas ĝin kompreni: ĝi okazas en "la tago de la Sinjoro", kiam la komunumo kolektiĝas por la Eŭkaristio kaj solenas la venkon de la Kristo super la morto, kaj dum Johano troviĝas en la insulo Patmo, li estas ekzilita pro sia atesto pri la vorto de Jesuo. Por vidi kion la Spirito volas montri al li, Johano devas ŝanĝi sian vidpunkton, kaj dufoje li diras "mi min turnis" (Apok. 1,12): tio signifas ke oni ne povas kontempli kion la Sinjoro volas komuniki al la homoj konservante poscion jam fiksitan de la tradicio. Necesas konsideri la eventojn el malsama vidpunkto, ne el tiu disvastigita de la povsistemoj, sed el tiu sugestita de la Spirito, agordiginte la rigardon kun tiu de la Kreinto kiu "rigardis ĉion, kion Li kreis, kaj vidis, ke ĝi estas tre bona." (Ĝen. 1, 31).

Johano, estas la unua homo kiu perceptas potencon voĉon ĉe siaj ŝultroj, kaj ĝin oni komparas al trumpetsono; tiu ĉi bildo rememoras la viziojn de la biblia tradicio^[9], kie la dia voĉo estis ne reproduktebla kaj povis nur esti klarigita. Samtempe la simbolismo de la trumpeto reelvokas la imponecon kaj la kultemon de la aŭdenda mesaĝo. La parolado malantaŭ la ŝultrojn indikas unu el la karakterizoj de la dieco kiam ĝi sin rivelacias: neantaŭvideblon, nekompreneblecon, transcendon. La aŭdado kaj komprenebleco de la vorto devas esti unuiĝitaj: en la homo Jesuo resonas la voĉo de Dio mem.

Johano prezentas la bildon de "la homfilo" meze de "sep oraj kandelinoj", tiu estas la bildo de la Eklezio en ĝia historia dimensio (vd. Apok. 1, 19), Li havas gravegan dignon, kiun oni rekonas el longa vestaĵo (vd. Eliro 28, 2- 4; Zeĥ. 3, 1- 4; Saĝ. 18, 20- 24) kaj el la ora zono kiu karakterizas ne nur la plejaltajn sacerdotojn, sed ankaŭ la reĝojn (vd. I Mak. 10, 89; 11, 58). Poste oni priskribas la fizionomiajn apartaĵojn de la rolanto, ekante de lia kapo kaj hararo, kies blankeco "kiel tiu de blankega lano" (vd. Read. 7, 9), revokas al la memoro la dignon, la saĝecon kaj la eternecon. La postaj karakterizoj rilatantaj la "homfilon" aludas la manierojn per kiuj la homo influas la ĉirkaŭantan mondon, kaj demontras grandegan forton: la

trapenetranta rigardo de Kristo (*"la okuloj kiel fajroflamo"*), ilia firmeco kaj neŝancebla forto (*la piedoj el multevalora metalo*), la potenco kaj universaleco de lia mesaĝo (*"voĉo kiel tiu de multaj akvoj"*), lia vitala rilato kun la eklezioj (*"la steloj en la dekstran manon"*), lia liberiga vorto (*"la glavo foririnta el la buŝo"*), lia dia kondiĉo (*"la vizaĝo kiel suno"*)

* La vizio de la Ŝafido

La bildo kiu pli bone prezentas Kriston en la Apokalipso estas tiu de la buĉita Ŝafido (vd. Apok.5,6.9.12; 13,8), kaj ĉe la lumo de tiu ĉi bildo oni devas legi kaj kompreni la enhavon de la dua parto de la verko mem^[10]. Pere de tiu ĉi bildo Jesuo estas prezentita kiel tiu kiu estas trafita de violenta morto, kies videblaj signoj postrestas (vd. Joh. 20,20), tamen Li ilin supervenkis per la forto de sia Amo, restariginte la komunecon de Dio kun ĉiuj homoj. La Ŝafido estas prezentita vere detale, ekante de lia ĉefa trajto, kiu estas lia neordinara staranta pozo. Tiu ĉi apartaĵo altiras kiel unua la atenton de Johano kaj utilas por substreki la resurekton de Kristo kiel bazan okazaĵon por la fondado de la kristana komunumo.

La verkinto de la Apokalipso refreŝigas la malnovtestamentan temon de la ŝafido buĉita okaze de la pasko (El. 12, 1- 14; vd. Readm. 7, 8; 13, 5) sed li ĝin interpretas per aparta maniero, por priskribi la novan kaj definitivan eliron kiu estas komencita de Jesuo.^[11]: la Kristo-Ŝafido simbolas la liberigon kaj la savon por la tuta homaro (vd. Joh.1, 29).

La buĉita Ŝafido, lokita meze de la trono de Dio (Apok.5), estas identigita de la verkinto al Dio mem, kaj estas kunigita kun lia ago antaŭenigi la savan planon por la homaro. *Tiu kiu sidas sur la trono* intervenas kaj agas en la historio laŭ la donacita amo elverŝita de Kristo krucumita. La simbolismo pri la dia trono estas malplenigita el ĉiu elemento kiu povu rememori la terajn tronojn kiuj baziĝas sur la regado kaj sur la perforto.

La aparta karakterizo de tiu ĉi Ŝafido estas videbligita de du distingaĵoj: la **sep kornoj** kaj la **sep okuloj**. La korno, en la antikveco, estis simbolo de la potenco kiu pretas ekagi; la okulo estis la organo de la komunikado (vidi kaj scii) kaj, aplikita al Dio, ĝi fariĝas simbolo de la Spirito kiu, sendita surtere, vidas kaj konas ĉion. La Ŝafido posedas la plenecon de la dia povo kaj rigardo, lia kapablo efiki vive en la historio estas fiksita de la unika maniero ĝin percepti kaj manifestiĝi al ĝi la dian kompaton^[12].

Alia vidpunkto kiu helpas la komprenon de tiu vizio estas la kontraŭstaro inter ĉio kion Johano aŭdas (Apok. 5, 5) kaj kion li vidas (Apok.5,6). Li aŭdas de unu el la presbiteroj ke *"la leono el la tribo de Jehuda, la Markoto de David, venkis"*. Temas pri mesiaj kvalifikoj kiuj elvokas bildon de akcentita nacista deveno pri la triumfanta mesio kaj ties venko super la paganaj nacioj^[13]. La du esprimoj "leono" / "markoto" reciproke kompletiĝas, la Mesio devis naskiĝi el la

tribo de Judaso kaj havi reĝan kaj profetan karakterizon; li estas prezentata kiel "la venkinto", aludante la plenigon de la promeso de Gen. 49, 10, sed, precipe la paskan venkon de Kristo.

La bildo de la "leono" tamen, ne kongruas kun kion Johano vidas per propraj okuloj: "*ŝafidon starantan kiel murditan (buĉitan)*". La ŝafido, fakte, aperas, neatendite, post kiam oni anoncis la venkon de la leono de Judaso. La neatendita ŝanĝo el "leono" al "ŝafido" estas klara signo pri la fakto ke Johano ne konsentas kun la siatempa juda penso, kiu daŭrigis esperi pri venko de la "leono de Judaso" super la malamikoj de la Izraela popolo (la romia imperio). Per la signoj de la violenta morto de Kristo, sed ankaŭ de lia resurekto, Johano prezentas pere de la bildo de la Ŝafido la veran venkinton; la venkon ne atingeblas per la forto aŭ per la superregado de nacio super la aliaj ("leono"), sed per la sindonemo ("ŝafido"). Malsame al juda tradicio rilate la atendon de la Mesio, kiu neniam kunigas la simbolismon de la Ŝafido al Mesio, la Mesio-Ŝafido de la Apokalipso uzas neniun formon de perforto nek de trudordono, ilia nura armilo estas tiu de la senpaga amo. La daŭriganta kaj fina supervenke de Dio super la malbono estas nenio alia ol la efektivigo de la decida venko de la krucumita Ŝafido.

La finaj tempoj

Legante la Apokalipso sub la gvidado de tiuj du "programaj" vizioj, oni povas atingi la riĉecon de ĝia mesaĝo, kaj ĝin korekte taksi. Per sia skribaĵo Johano intencas profeti nenion novan, nek volas priskribi la historion kiel kunligiĝon de eventoj kiuj devos realiĝi, sed, uzante la lingvaĵon de la simboloj, li malkovras konstantajn elementojn interne de la historiaj travivaĵoj^[14] por helpi la kristanan komunumon pli bone kompreni la historian realon en kiu oni vivas, kaj atesti la konsenton al la vorto de Kristo. Kiel "revelacio", la libro intencas deklari ke la Resurektinto estas la Sinjoro de la historio, ke Li ĉeestas kaj agas en ĝi por alvenigi al la fina punkto la plano de la savo (vd. Mat. 28, 20). Malgraŭ la ŝajno, la homa historio estas vivigita de Dio, pere de la vivpovo kiu fontas de la venko de Kristo super la morto. Dio ne intervenas en la historio determinante ĉiun apartan eventon, aŭ decidante jam antaŭe kiel ĝi devos

okazi (kvazaŭ temus pri antaŭpreparita ŝablono), sed Li intervenas en la homa historio plifortiginte per sia spirito la homon, tiel ke la homo faru elektojn ĉiam pli en agordo kun Lia vivplano (vd. Apok. 4, 1 -11; 21, 5). La novaĵo donita de la Apokalipso kiam ĝi prezentas la revelacion de Kristo kaj indikinte la tempo en kiu vivas la eklezioj kiel tiu de la pleneco, estas kompletigita preskaŭ ĉe la fino de la verkaĵo per la impona deklaro kiu sentigas de la trono de Dio: "Kaj la morto jam ne ekzistos; *ne plu ekzistos funebro, nek plorado, nek doloro; la unuaj aferoj forpasis.*" (Apok. 21, 4). La verko ne resendas al la tempofino, ĉar neniu konas kiel la eventoj disvolviĝos^[15], sed ĝi koncentriĝas sur la nuntempon, tiu en kiun la komunumo devas atesti la fidelan konsenton al la plano de la Patro. Anstataŭ ol pri "**tempofino**", la verkinto de la Apokalipso interesiĝas pri la "**tempoj de la fino**", tio estas pri la nuno de la Eklezio kiu vivas en la fina stadio de la homa historio, tiu komencigita de Kristo per sia morto kaj resurekto. Ne ekzistas nova plano atendinta, ĉar per la resurekto de Jesuo la malbono estis venkita ĉe ĝia radiko kaj komenciĝis la lastaj tempoj, tiuj de la efektivigo. Ĉe la lumo de la sava plano revelaciita de Kristo, la verkinto de la Apokalipso intencas centriĝi la atento de la kredantoj sur ilia nuntempon kaj sur la ateston favore de la Regno en la tempo de la pleneco kie realiĝadas tiu plano.

Ricardo Pérez Márquez

Centro pri Bibliaj Studoj "G. Vannucci"

Montefano (Mc)

[1] Kiel, ekzemple, la relegado de la Sanktaj Skribaj tekstoj; la interveno de anĝelaj spiritoj; la uzo de simboloj, aparte de tiu aritmetika; la disdivido de la rakonto en cikloj (septaktaj); la dialektiko inter la bono kaj la malbono; la neniigo de la Malamiko; ktp.

[2] Vidu la resendon al tiu ĉi problemaro en Rm 13, 1; I al Tim. 2, 2; 6,1; Tit. 3,1.

[3] La unua el la sep beatanoncoj kiuj superŝutas la verkon (vd. Apok. 1, 3; 14, 13; 16, 15; 19, 9; 20, 6; 22, 7 . 14).

[4] Sep fojojn en la unua parto de la libro revenas la invito je la aŭskultado de la Spirito: Apok. 2, 6. 11.17,29; 3. 6.13. 22

[5] La Apokalipso prezentiĝas kiel teksto kun "dialogaj karakterizaĵoj", kaj tio okazas danke al simbola lingvaĵo uzata de la verkinto, en la itala vd.G. Biguzzi, *Apocalisse*, Milano 2005. La simbolismo de la bildoj estas "strukturita malkontinue", tio estas la verkinto kunmetas samnivele malsamajn elementojn devenantaj el la biblia tradicio por krei novan bildon kun malegalaj niveloj de interpreto (vd. Apok. 5, 6). La uzo de la simboloj havas simolan kaj teologian celon krei simolan universon kie la leganto kaj la aŭskultantoj povu plene merĝi tiel ke ili lasu sin influi de ĝi kaj ili modifu sian manieron perceptila mondon, vidu, en la itala : U. VANNI, *L'Apocalisse*, Bologna, 1988 paĝ 73- 86.

[6] La *kairòs* estis malpli granda diaĵo de la greka panteono kiu prezentiĝis kiel knabeto kun flugiloj ĉe siaj piedoj kaj kun hartufo sur la nuko; tiu diaĵo estis simbolo de la favoraj okazoj kiuj presentigis abrupte al la homoj kaj ke oni ne devis lasi forfuĝi sed oni devis preni tiun knabeton ĉe la hararo antaŭ ol li preterpasu.

[7] La proponoj pri la literatura strukturo de la Apokalipso kaj pri la maniero disdividi ĝin en partoj estas sennombraj, tamen la pli subteninda estas tiu ĉi: Unua Parto: 1, 4- 3, 22/ Dua Parto: 4, 1- 22, 5 en la itala vidu U. Vanni, *La struttura letteraria dell'Apocalisse*, Roma, 1971.

[8] En la Malnova Testamento la esprimo "la vivanta Dio" (Jer. 10, 10) rilatas Javeon kaj lian povon doni la vivon al la kreitaĵoj. La sama vivo fonto estas en Jesuo, kiu oferdonas al la homoj la donacojn kiuj ŝpruĉas el ĝi (vd. Apok. 2,7, 10; 3, 5; 7,17; 13, 8; 20, 12.15; 21, 6; 22, 2. 14. 19). La kvalifiko "la Vivanto" enhavas antagonistan kaj polemikan sencon kontraŭ ĉiuj aliaj malveraj diaĵoj kiuj volas sin trudi ĉe la homoj per iliaj fortoj kaj regado; Johano preparolos ilin kiel pri pasintajn realaĵojn, "ili ekzistis sed ne ekzistas" (Apok. 17, 8). La bildo de la ŝlosiloj estas tre originala, dum en Rm 6, 9 oni diras ke la morto nenion plu povas kontraŭ Kristo, la verkinto de la Apokalipso renversas la eldiron donante al ĝi eĉ pli fortan valoron: estas Kristo kiu havas povon super la morto kaj posedas la ŝlosilojn de ĝia loĝloko (vd. Apok. 1,18).

[9] Sur la monto Sinajo la revelacio de Dio estis anoncita per fortega trumpetado (vd. Eliro 19, 16)

[10] La termino **ŝafo** (gr. arnion) rilatanta Kriston, ripetiĝas 28 fojojn en la Apokalipso, el kiuj sep aperas en diroj kiuj ĝin kunigas al Dio (Apok. 5, 13; 6, 16; 7, 10; 14, 4; 21,22; 22, 1.3). Kvar estas, post sep, la cifero kiun oni trovas pli ofte kaj regule en la Apokalipso. Kiel sep, kiun oni konsideras la nombro de la kompleteco, kvar reprezentas la mondon kun ĝiaj kvar anguloj (vd. Apok.7,1; 20, 8) aŭ la kvar disdividoj (Apok. 5,13; 14, 7). La ripetiĝo je 7 x 4 aludas la universalan kadron de la venko atingita de la Ŝafido, kaj kongruas al la kvaronigitan strukturon de la parolturno per kiu Johano indikas ĉiujn landojn de la mondo ("popoloj, triboj, lingvoj kaj nacioj").

[11] En Apok. 15, 2-4 la sekvantoj de la Ŝafido, kiuj supervenkas la beston estas konsiderataj kiel la nova liberigita popolo. Ili staras sur la kristala maro kaj kantas la kanton de la Ŝafido. Johano uzas la bildojn de la nova eliro por montri ke tiu sava evento jam efektiviĝis, kvankam la celpunkto ankoraŭ ne estas atingita

[12] Johano klarigas ke la sep okuloj simbolas la sep spiritojn de Dio kiuj estis senditaj sur la tutan teron, tiu estas la fekundeco mem de Dio kiu daŭrigas agi en la kreitaro por atingigi al ĝi ĝian plenecon. Dum la sep kornoj reprezentas la plenecon de la dia forto, la sep okuloj indikas manieron rigardi laŭ graco kaj povo.

[13] Vd. Gen. 49, 9; Jes. 11, 1.10; la resendo al Malnova Testamento estas tiu al beno de Judaso fare de Jakobo kaj al la venko super ties malamikoj (Vd. Gen. 49, 8-12), sed la verkinto modifas la tekston por indiki la bildon de la Mesio. Same la esprimo "markoto de David" ne troviĝas en la M.T. nek en la N. T. sed nur en la Apokalipso (Vd. Apok.22, 16) kaj ĝi resendas al Jes. 11, 1. 10; la ŝanĝo farita de Johano utilas por pli bone fokuzigi la ideo de mesianismo; la markoto ne indikas la posteularon sed la prapatrojn de David; la Mesio ne estas la markoto generita de David, sed ĝi estas la markoto el kiu David naskiĝis kaj samtempe li apartenas al ties posteularo (vd. Apok. 22, 16).

[14] Ekzemple la "kvar rajdantoj" en Apok. 6, 2-8 reprezentas la evoluojn de vivo aŭ de morto kiuj enŝoviĝas en la historio.

[15] Dum la renkontiĝo kun la Resurektinto la disĉiploj revas pri la glora restarigo de Izraelo kiu devis okazi je la fino de la tempoj: *"Sinjoro, ĉu en ĉi tiu tempo vi restarigas la regadon al Izrael? Kaj li diris al ili: Ne apartenas al vi scii tempojn aŭ epokojn, kiujn la Patro rezervis en Sia aŭtoritato...."* (Apok. 1, 6)